

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1997:4

Ore la nubar' nuancas,
En herbej' la nimfoj dancas
Kaj la harpon ĉe l' rivero
Ludas Niks' en la vespero.

TRADUKO BALDAŬ CENTJARA:

STAGNELIUS/AGRELL

Redaktion:Jan Setréus
Franko Luin (teknisk redaktör)**Frågor om prenumeration o. dyl.:**Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00E-post: espero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: HA Reklamtryck AB, Stockholm

Prenumeration 1997: 170 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10E-post: sef@esperanto.se
www.esperanto.seÖppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1997:Direktansluten medlem 170 kr.
Famijemedlem (utan tidning) 75 kr. Ungdomsmedlem
(max 20 år) 75 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt
medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund
och får dess tidning *Kvinpinto*.

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Fontid: Samma som EsperantoCentro Stockholm.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Bertil Nilsson

Manusstopp *La Espero*: den 30 oktober

OBS!**Manus till *La Espero***sänds till Jan Setréus
Mörtg. 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden

Post Aŭstralio

Nova kongreso, nova injekto. mi partoprenis en 24 kongresoj de UEA kaj per tio ricevis 24 injektojn. Renkonti novajn homojn kiuj kun espero iam ekstudis la internacian lingvon pro diversaj kaŭzoj, ĉiam estis agrabla sperto por mi.

En ĉiu kongreso aperas prelegantoj, artistoj kaj aliaj, kiuj lerte kaj flue esprimas siajn pensojn en elegantaj parolturnoj. Estas ĝuo por miaj oreloj kiam mi aŭskultas diversajn personojn kiuj tiel facile kaj senpere traktas ne gepatran lingvon, sed fremdan lingvon.

Bonaj libroj en esperanto estas grava parto de la esperantista kulturo, malgraŭ la fakto, ke ni esperantistoj legas terure tro malmulte literaturajojn. La librovendejo de ĉiu kongreso estas vizitenda loko. Tie videblas ke troviĝas tre bonaj verkistoj kaj tradukistoj en Esperantujo. Vendistoj de libroj en esperanto ne fariĝas riĉaj pro la fakto, ke ni

esperantistoj ne sufiĉe bone komprenis, ke legado (kaj relegado) de libroj estas eble la plej bona rimedo studi kaj profunde lerni la lingvon.

Legi librojn estas bonega lernometodo, ĉar vi fojon post fojo ripetas vortojn kaj kutimiĝas al multaj diversaj frazostruktoj. Tiuj vortoj kaj frazostruktoj akumuliĝas en via cerbo kaj iom post iom fariĝas parto de via aktiva vortprovizo. Vi ne devas aĉeti dikana libron por komenci. Troviĝas pluraj novaj maldikaj libroj, kaj mi unue pensas pri la libroj kiujn Sten Johansson produktis. Estas mallongaj noveloj el konataj libroj de svedaj verkistoj. La originale verkitaj libroj de Sten Johansson estas absolute rekomendindaj. Ekzemple lia nova detektiva romaneto "Falĉita kiel fojno". Aĉetu ĝin, ĝuu kaj fariĝu lingve lerta.

Roland Lindblom

DEBATT

"Strukturella svagheter"

I *La Espero* nr 1 1997 refererade vi en pĝaŝande debatt i Danmark. Som svar pĝ kritiken mot artikeln om esperanto i Den Store Danske Encyklopædi skriver artikelförfattaren Jan Katlev i den danska esperantotidningen *Esperanto-nyt* nr 2 1997, att de som vill lära sig esperanto men inte har ett brinnande intresse kan hämmas av en del strukturella små svagheter i språket.

Han baserar sin slutsats på att esperanto i mycket högre grad än indoeuropeiska nationalspråk bygger sina ord med hjälp av oföränderliga ordelement, så att orden inte blir "naturliga". Om man kommer förbi enbart inläringen av ett planspråk som ett rent tekniskt hjälpspråk genom praktisk användning av språket, villket är fallet med esperanto med dess egna litteratur m.m., så blir det emellertid lika naturligt som modersmålet.

Preben Bagger betonar i sin svarsreplik att artikeln i encyklopedin inte med ett enda ord nämner esperantos kultur, och att man av Katlev kan få intrycket att esperantos enda roll kan vara som hjälpspråk. Men, menar Bagger, ett sådant rent tekniskt hjälpspråk är en utopi. En förutsättning för ett internationellt hjälpspråk är att det också är ett kulturspråk.

Bagger klagör också att esperanto har en unik ställning bland språkprojekten. Språket kom snart att dominera marknaden för planspråk, och har sedan dess inte överflyglats av något annat språk som kunnat erbjuda betydande lingvistiska förbättringar. De språk som skulle innebära förbättringar av esperanto, såsom ido, novial och interlingua, har i praktiken inte visat sig lika livskraftiga.

Jan Setréus

Esperanto-semajno 3-9/8 1997 en Haapsalu, Estonio

En 1989 mi partoprenis vojaĝon tra Estonio kaj en 1991 KELI havis sian kongreson en Jönköping. Tiam ni invitis kristanojn el orientaj landoj, inter ili du knabinojn el Tallinn kaj virinon el Haapsalu. Pro tio mi volonte volis renkonti la virinojn kaj cetere ekscii kiel la situacio nun estas en la libera Estonio.

Sirje staris ĉe la paskontrolo en Tallinn por ĉirkaŭbrakumi min kaj mian amikino. Per propra aŭto ŝi veturigis nin al sia hejmo kaj poste al Haapsalu. Ni baldaŭ ekvidis la ruinojn de la antaŭe rusaj kazernoj. Tamen oni multe novkonstuis kaj riparis malnovajn domojn. Ne estis multe da ripozo dum la semajno. La baltaj esperantistoj estas lertaj, diligentaj kaj parolemaj.

Origino de estonoj

Valev Kruusalu prelegis lunde pri la origino de estonoj kaj ilia historia najbareco. Estonoj apartenas al la vasta sed ne granda finno-ugra familio. La urala teorio pruvas, ke la nunaj finno-ugraj kaj samojedaj popoloj iam estis unu urala origina popolo. Precipe interesas nin tiu parto de la teorio de finna lingvisto E.-N. Setälä. La kunvivado de la popoloj daŭris ĝis 2.500 a. Kr. Oni devas serĉi la originan hejmon ie en la orienta Rusio pli precize en la mezo de la riverfluo de Volgo. Ĉe la Balta Maro ili havis kontakton kun ĝermanoj kaj poste kun slavoj. Ĝermanaj vortoj enestas en la lingvo.

Ahto Kaljusaar, la prezidanto de Esperanto-Asocio de Estonio informis pri la situacio de EAE.

Ekskursoj

Ni ekskursis al la kastelo kaj aŭdis pri ĝia historio. Poste ni iris al restoracia salono kie estis koncerto. Pri Estona Esperanto-Instituto parolis ĝia direktoro Vjaĉeslav Hromov. Esperanto estas instruata en Kehra, Tartu, Haapsalu, Kohtla-Järve, Viljandi kaj Võsu. En Tallinn funkcias kvar kursoj.

Vespere estis popolaj dancoj. Ĉiuj partoprenantoj estis tre lertaj, viglaj kaj ĝojgaj. Ni multe aplaudis ilin.

Merkrede estis vekiĝo je la kvina. La aŭtobuso atendis nin je la sesa antaŭ la gimnazio por vojaĝo al la haveno. Tie ŝipo atendis nin por veturado al la insulo Hiiumaa. En la ŝipo ni povis trinki kafon i.a. Post unu kaj duon-hora vojaĝo ni atingis la celon. Aŭtobuso ĉe la haveno veturigis nin ĉirkaŭ la granda insulo. Ni haltis ĉe la preĝejo Pühalepa. Ĝi estas unu el la plej malnovaj preĝejoj en Estonio. Dum la soveta tempo oni uzis ĝin kiel grenan magazinon. La nura predika katedro el ŝtono de 1636 troviĝas tie. Bedaŭrinde ni ne povis eniri.

Soera bienmuzeo estas vizitinda. Ni povis aĉeti manlaborojn kiel lumkandelojn kaj trinki fruktsukon aŭ kafon. Tagmanĝon ni povis aĉeti en malgranda restoracio Veltsi. Ili ne atendis tiom da homoj kaj multaj devis atendi tutan horon por la mendita manĝaĵo. La

aŭtobuso veturigis nin al pado, kie ni povis iri en sablo al la plej bona banstrando de Estonio. Ne estis skribita en la programo kaj neniu kunprenis banvestojn. Mi partoprenis en la grupo, kiu povis grimpi la malnovan lumturon. La ŝtupoj estas tre altaj, pli ol tri dm kaj kune kun la lastaj lignaj ŝtupoj estas 115 ŝtupoj. La vidaĵo estas grandioza. Pro la varmeĝo mi trinkis multe. Nur je la 22a horo kaj duono ni venis reen al la gimnazio.

La venontan tagon estis ankaŭ aŭtobusvojaĝo sed nur en la ĉirkaŭaĵoj de Haapsalu. Ni ekvidis la hejmon de la pentristo Ants Laikmaa. Ĝi memorigas min pri la hejmo de Anders Zorn. La hejm-historia muzeo Koela estas bieno lasita en la stato de 1880.

Instruas la svedan

Post tiuj muzeoj ni veturis al Noarootsi. Fine de la 13-a jarcento svedoj loĝis tie, antaŭ la milito ankoraŭ 3.000. De 1991 ili havas gimnazion kun gelernantoj el la tuta lando. La sveda lingvo estas instruata kvin horojn semajne. La gimnazio havas 30 geinstruistojn. Unu instruisto venas de Svedio kaj alia de Finnlando.

La pensionon de Bergsby posedas Arne kaj Kai Tennisberg. Ni trinkis kafon tie kaj eniris ĉiujn ĉambrojn. Ili estas luksaj. Esperantistoj ricevas rabaton je restado tie. Tranoktado kun matenmanĝo kostas 200 EEK, lunĉo 80 EEK (100 estonaj kronoj = 54 svedaj kronoj). Troviĝas saŭno kaj eblas prunti biciklon.

La ekskurso finis per esperanta diservo en Ridala baptista preĝejo. Ĝi estas sufiĉe nova kaj moderna. Pastro Aare Tamm lernis Esperanton antaŭ 30 jaroj. Ni aŭskultis ĥoron de gejunuloj.

Vendrede estis ronda tablo, kiun gvidis V. Hromov. Ede Puskar prelegis pri la nuna vivo kaj la salajroj en Estonio. Tõnu Hirsik rakontis pri siaj impresoj de la Esperanto-domo. Li partoprenis kurson de Lars Forsman. Mi raportis pri la historio de Esperantogården. La adiaŭan vesperon ni ricevis trinkaĵojn kaj estis dancado.

La foto montras la Soeran bienmuzeon



Arne Lundkvist

La lingva vojaĝo

NOVA ADRESO

Fredrik Olofsson
(kasisto de SEJU kaj
estrarano de SEF)
havas novan adreson:
Idrottsv. 19 B
461 40 Trollhättan

La ŝtataj fervojoj eldonas revuon kun la iom cirilaspekta nomo TURoRETUR. La pasaĝeroj trovas la revuon en la trajno kaj rajtas legi ĝin survoje aŭ kunpreni la magazinon hejmen. Ĉiama rubriko estas "Språkresan" (La lingva vojaĝo) skribata de Lars-Gunnar Andersson.

En la tria numero ĉi-jare la titolo de la artikolo estis "Ĉu ĉiuj lingvoj estas same malfacilaj?" Mi ne dubas ke la legantaro de La Espero centprocente kapablas respondi la demandon, sed eble la legantaro de TURoRETUR ne unuanime povas. Andersson donas ekzemplon pri lingvo malriĉa je fonemoj (13) kaj sekve facila, kaj alia riĉa (156) kaj sekve malfacila. Andersson ankaŭ klarigas la diferencon inter "sintezaj" (riĉaj je derivadoj kaj fleksioj) kaj "analizaj" lingvoj. La analizaj estas pli facilaj. La piĝinaj lingvoj estas analizaj. Fakte troviĝis piĝina lingvo laŭ la bordo de la Arka Maro, parolita de norvegaj kaj rusaj fiŝistoj, la t.n. "rusnorsk" (la rusnorvega). Unu karakterizaĵo de la lingvo estis ke personpronomoj ne distingis la nominativon aŭ akuzativon, nek diferenciĝis de la posedpronomo: *mi*, *min* kaj *mia* ĉiuj estis "moja". La ununura prepozicio estis "po". La komparacion oni konstruis per "mera" (pli) anstataŭ fleksii (aŭ tute ŝanĝi) la adjektivon.

En la kvara numero de la jaro Andersson skribas pri malgrandaj ŝajne sensencaj vortoj en la sveda parola lingvo, kiel "va" kaj "typ", montrante ilian valoron.

En la kvina numero la titolo estas "Finns norrländska?" (Ĉu ekzistas la "norrlanda"?), sub kiu titolo Andersson klarigas kiel lokaj dialektoj unuiĝis al regiona dialekto.

En la ĵus publikigita numero ses la gazetisto priskribas la t.n. ŝibolet-funkcion de la lingvo. Ŝibolet estis vorto hebrea kies signifo estis akvofluo. Laŭ la Malnova Testamento la gileadanoj^o, izraela tribo, uzis la prononcon de tiu vorto por distingi la efrimidajn^o, malamika tribo. Simile la prononcado, literumado, elekto de vortoj k.t.p. distingis sociajn grupojn en nia lando.

Kiel rilatas ĉio ĉi tio al Esperanto? Jen kontraŭdemando - Ĉu io pri lingvoj ne rilatas al Esperanto?

Aldone mi volas informi ke la revuo de la Ŝtataj Fervojoj ankaŭ havas paĝon por leteroj al la redaktoro.
(^o proponata neologismo)

Jan Setréus

Post Graz: Komunikado kaj propono

En la Dua Eŭropa Ekumena Kunveno, Graz/Aŭstrio, 23-29 junio 1997, kun la temo "Repaciĝo - donaco de Dio kaj fonto de nova vivo", aktive partoprenis Ekumena Esperanto-Grupo, konsistanta el kristanoj, membroj de diversaj eklezioj el Aŭstrio, Britio, Bulgario, Ĉeĥio, Estonio, Germanio, Hungario, Italio, Kroatio, Latvio, Litovio, Nederlando, Pollando, Rumanio, Ruslando, Slovakio, Svedio kaj Ukrainio.

La spertojn el Graz ni interŝanĝis kaj la rezultojn ni pritaksis tuj post Graz dum konferenco en la hungara urbo Zalaegerszeg, de la 29a de junio ĝis la 6a de julio 1997.

Ekspozicio

Sur la "agoro (agorá) de repaciĝaj iniciatoj" en la plej granda ekspozicia halo de la foiro de Graz, la 42-kapa Esperanto-parolanta teamo deĵoris dum la tuta daŭro de EEK2 kun stando en tre konvena loko, por oferti lingvan peradon inter 18 lingvoj kaj por informi pri "Esperanto kiel ekumena lingvo en la servo de la evangelio". Ni najbaris al multaj societoj kaj movadoj, kies celo estas tre parenca al nia propra. Ni konstatis, ke al multaj el ili ni utile povus kontribui por venki la obstaklon de multlingveco, iafoje ege ĝena aŭ eĉ kaosa. Ĉe nia stando videblis libroj en Esperanto, i.a. la Sankta Biblio en presita formo kaj, unuafaje inkluzive de la dua-kanonaj libroj, ankaŭ sur kompakta disko (CD-ROM), same la nova Roma meslibro aprobita de la Vatikano kaj presita en Romo.

Martiroj

Portreto de la martira pastro Max Josef Metzger kaj foto de lia memortabulo ĉe Karmeliterplatz en Graz atentigis pri ties agado en ĉi urbo (1917-1927), kie li, pioniro de ekumenismo kaj batalanto por interpopola paco, redaktis en Esperanto la gazeton Katolika Mondo. Unu el tri ekzamenoj ("hearings") speciale traktis lian signifon por la ekumena movado. Diversaj parolantoj prezentis, krom tiun de Maz Josef Metzger (†1944), ankaŭ la vivon kaj verkon de la alia patro de la koncilia procezo, Dietrich Bonhoeffer (†1945), kaj la kontribuon de Robert Schuman por la repaciĝo inter francoj kaj germanoj. Por la ĉeestantoj, kiuj ne komprenis la Internacian Lingvon, oni interpretis kaj la prelegojn kaj la diskuton el la Esperan-

ta originalo en la germanan.

Moderna latino

Plej feliĉige la teamo spertis la bonegan servon de Esperanto kiel moderna latino de la eklezio en la diservoj ĉiutage okazantaj en la Kapelo de Ioanneum (la Stiria Landa Muzeo), en unu komuna lingvo, kvankam daŭre partoprenis anoj de 18 nacioj. Gregorianaj formoj de matena laŭdo (laudes), vesproj (vesperae) kaj kompletorio alternis kun formoj el la reformaciaj eklezioj. Ĉiuvespere pastroj el Germanio, Hungario kaj Italio kuncelebris sanktan meson. Tiu komuna preĝado en unu lingvo, sen privilegiado de unu nacio, formis la centron por la agado de la Ekumena Esperanto-Grupo en Graz; ne malhavebla estis la Ekumena Liturgia Libro 136-paĝa, speciale kompilita por Graz, kiu enhavas, kun muziknotoj, ne nur taŭgajn kantojn rilate al la temo de la Ekumena Kunveno kun ties sub-temoj, sed ankaŭ la tekstojn por la matenaj kaj vesperaj preĝoj, du sanktajn mesojn kaj kompletan diservon laŭ Taizé el la nova germana Evang. Gesangbuch.

Lingva egaleco

Ni danke rekonas, ke en Graz oni videble kaj aŭdeble faris grandajn fortostreĉojn por fari justecon al la lingva kaj kultura diservo de Eŭropo. Tamen ni spertis, ke ofte grandaj grupoj pasive devis sidi, malbone aŭ tute ne komprenante unu, el la "grandaj" lingvoj. Granda plimulto de la partoprenantoj suferis malegalecon. Spite de tiu situacio ĉiupaŝe spertebila dum la tuta semajno, ŝajnas al ni, ke mankis serioza klopodo por almenaŭ esplori, ĉu tiu diskriminacio vere estas neevitebla. Ja rimarkindas, ke en la listo de delegitoj oni uzis latinon kaj ne nacian lingvon por indiki la landojn; tio povus esti interpretata kiel komenco de konsciigo pri la problemaro. Sed cetero trudas sin la impreson, ke malgraŭ ĉiuj deklaroj pri paco kun justeco ankaŭ kultura, oni inklina fatalisme akcepti, kvazaŭ fakton nature aŭ die donitan, la neglekton de multaj "malgrandaj" lingvoj favore al privilegiado de kelkaj "grandaj", same kiel ne utilas diskuti pri la neegala, do maljusta distribuo de la vetero en la mondo.

Surbaze de niaj spertoj de egalrajta interkomunikado sen teknikaj rimedoj pere de la neŭtrala internacia lingvo.

kies lernado en si mem jam estas paŝo repaciga, ni proponas al ĉiuj respond-eculoj en eklezio kaj socio, ke ili serioze konsideru la kontribuon, kiun nia alter-nativo de nova "moderna latino de la eklezio" povus doni por pli da justeco kultura kaj interhoma, precipe vide al la plivastigo de Eŭropo orienten.

En la fino de semajno dediĉita al revuado kaj daŭrigo de la temoj de Ba-zelo kaj Graz, en Zalaegerszeg, Hunga-rio, 6 julio 1997

Nome de la Ekumena Komisiono de IKUE (katolika) kaj KELI (protestanta):
Adolf Burkhardt,
Weilheim an der Teck (prez. de KELI)

Estraranoj:

Eld van Dijk-Kuperus, Den Haag
Éva Farkas-Tatár, Budapest
David Featherstone, London
Siegfried Krüger, Heilbronn
Britta Rehm, Göteborg

Kontakt-adresoj:

Centra Oficejo de IKUE
Via di Porta Fabbrica 15
I-00165 Roma RM
Sokr. de KELI
s-ino Els van Dijk-Kuperus
Koningsmantel 4
NL-2403 Alphen a/d Rijn
Britta Rehm
Kopparmyntsgr. 3
414 79 Göteborg
tel. 031-41 02 56

KULTURA ESPERANTO-FESTIVALO

KEF '98

10-16 aŭgusto 1998

LESJÖFORS
Svedio

La kvina kaj fina survojas...

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO
de Ebbe Vilborg

Eldona Societo Esperanto

VAD ÄR KELI?

Ett språk – en tro

Vid 7:e världskongressen i Antwerpen 1911 bildades av kristna esperantister från England, Frankrike och Tyskland förbundet Kristana Esperantista Ligo Internacia i dagligt tal benämmt KELI. Det hade till en början sina starkaste förankringar inom internationella KFUM och Christian Endeavour Society men har i våra dagar medlemmar från de flesta evangeliska trosriktningar och är således en ekumenisk rörelse. Ordförande är den tyske prästen Adolf Burkhardt.

I Nia Historio av H.A. de Hoog kan vi läsa många intressanta saker om KELI:s historia. Den första esperanto-predikan i Sverige skedde den 29 juli 1914 vid den svenska Esperanto-kongressen i Malmö.

Den unge finländaren Heino Pätiälä hälsade kongressen från Finland och talade om Guds kärlek samt den stora betydelsen, som Esperanto har för kristenheten. Två dagar senare fanns han i Berlin på väg till UEA-kongressen i Paris. Då det första världskriget hade brutit ut, tvingades han resa hem. Till kongressen i Paris hade anmälts 3.700 personer, men den inställdes.

Svenska sektionen

1934 var världskongressen i Stockholm. Arthur Wallin och Ivar Karlsson var aktiva esperantister. Vid ett KELI-bord hade Ivar Karlsson, Leksand, ritat ett stort KELI-märke. Vid gudstjänsten i Storkyrkan deltog mer än 600 personer. Pastor Algot Törnqvist från Gävle predikade.

Den 10:e januari 1935 bildades den svenska sektionen av KELI hemma hos Inga Kristoffersson. Den första styrel-

sen bestod av Gunnar Furhammar, Ivar Karlsson, Arthur Wallin, Inga Kristoffersson och Erik Carlén.

Bland de mest aktiva medlemmarna var Anna Henriksson. Hon gifte sig med en medlem i Stockholmsgruppen, Fritz Alamo. Under namnet Anna Alamo blev Anna känd i esperantovärlden. Efter bara ett treårigt äktenskap avled Fritz Alamo.

Erik Carlén föreslog, att Anna skulle vara en resande Esperanto-missionär. Hon anställdes som resekreterare. I en barack för flyktingar, som ägdes av SMF och dess pensionerade missionsföreståndare Axel Andersson, hade KELI sin första kongress.

För svenskarna, som deltog i Tos-tarp, blev det en angenäm förkongress till den stora UEA-kongressen 1948 i Malmö. Anna förlovade sig med Karl Olof Sandgren.

1951 hade den svenska sektionen av KELI en gruppresa till Marktleuthen för att vara med på en KELI-kongress. Ledaren för gruppen var Ingmar Gustafsson, en ung pastor. Sedan blev han rektor för Karlskoga folkhögskola. Han understödde undervisning i Esperanto. Lars Forsman blev lärare för dessa kurser.

KELI idag

Vid Kristliga Esperanto-förbundets års-möte i Lesjöfors beslöts att skänka 10.000 kr till någon från Baltikum att delta i sommarkursen på Esperanto-gården i juni.

Varje år har KELI en internationell kongress. De senaste åren har dessa ägt rum tillsammans med katolikerna. De har då blivit verkligt ekumeniska.

Genom donationer till en fond har vi medel att bekosta deltagare i Esperanto-kurs, antingen på Karlskoga eller i Lesjöfors. För att få ett sådant stipendium, skall vederbörande ha en kristen livsåskådning.

Styrelsen för den svenska sektionen består av ordf. Karl Buremo, tel. 036 - 17 44 66; kassör Karl-Erik Eriksson, tel. 013 - 21 32 91; sekr. Agneta Järlström, tel. 08 - 591 225 07; Stig Kinnander, tel. 0504 - 103 88; Birger Viggen, tel. 08 - 612 58 51; suppl. Arne Lundkvist, tel. 036 - 30 86 98.

För närmare information om vår verksamhet kan du vända dig till någon av ovanstående personer.

Arne Lundkvist

KORESPONDI DEZIRAS

Viro de Ganao, 22-jara estrarano de Esperantoligo. Partoprenos Esperanto-kurson ĉe Karlskoga Popola Altlernejo 27/10-19/12 1997.

Konas nenien en Svedio. Finis la dek lecionojn de la Brita Asocio. Interesiĝas pri sporto, vojaĝado, filmoj kaj ideoj. Benjamin Offei Okae P.O. Box 2534 Accra Ganao

Fraŭlo 28-jara de Aŭstralio. Loĝas en la Ora Marbordo, kiu estas populara turisma regiono 100 km sude de Brisbano, la ĉefurbo de Kvinslando. Liaj hobiaj estas aŭskulti al mallongonda radiilo, uzi IBM-komputilon, legi

nefikciajn librojn kaj genealogi (Lia plej juna fratino kolektas poŝtmarkojn). Estas membro de UEA, Aŭstralio Esperanto-Asocio, kaj Esperanto-Federacio de Kvinslando.

Eklernis Esperanton antaŭ unu jaro kaj finis korespond-kurson. Volas korespondi kun iu inter 16-jara kaj 35-jara, kaj ne volas uzi la anglan.

S-ro Kevin A. Robb
139 Mattocks Road
Stephens QLD 4227
Aŭstralio

Sigurd Agrell, poeto

Pasintkristnaske mi foliumis en la unuaj jarkolektoj de Lingvo Internacia, tiuj, kiuj aperis en Upsalo. Mi speciale interesiĝis pri tradukaĵoj el la sveda literaturo por vidi, kiel oni sukcesis en tio dum la unuaj jaroj de esperanto, kun limigita kvanto da vortoj kaj, mi supozas, limigitaj lingvokonoj.

Unu nomo vekis mian atenton. Ĝi aperis jam en la unua jarkolekto de *Lingvo Internacia*, kiel mallongigo Sig. Agr., pli poste kiel tuta nomo Sigurd Agrell. La nomo Agrell estis konata al mi; oni povas relative regule legi artikolojn pri konflikto-demandoj verkitajn de Wilhelm Agrell. Kontrolo en la nacia enciklopedio konfirmis, ke la du agreloj estis parencaj: Sigurd estis avo de Wilhelm. Sed la enciklopedio ankaŭ informis min, ke Sigurd Agrell (1881 – 1937) estis sveda poeto, kun 7 eldonitaj poezikolektoj (*Arabesker*, 1903; *Solitudo*, 1905; *Hundra och en sonett*, 1906; *Den dol-da örtagården*, 1908; *Purpurhjärtat*, 1909; *Antika kaméer*, 1912 kaj *Valda dikter*, 1931), kaj ke li fariĝis profesoro pri slavaj lingvoj en Lund (1921). Nenio estas dirita pri lia esperantisteco.

Mi komencis serĉi pli sisteme la verkojn de Sigurd Agrell kaj trovis entute 15 da ili, publikigitaj en la jaroj 1896 ĝis 1900. Plejparte temas pri tradukaĵoj el la sveda literaturo, sed kelkaj estas originalaj.

"Och verkligen fick den unge mannen snart nog möjlighet att åter resa ut, denna gång till Polen. Han klarade sig till en början med esperanto och kom – jag har detta av Sigurd Agrell själv – på så vis i kontakt med en skomakare, som väl kände till hans namn från tidningsläsning: 'Sigurdo Agrelo' hade begått en dikt på detta oädla tungomål som gymnasist, och den hade spritts i världspresen, d. v. s. världsspråkspressen." (*Ivar Lindquist, Årsbok 1937, Vetenskaps-societeten i Lund*)

"En dag i september 1899 anlände till mitt inackorderingsställe [i Uppsala] den 18-åriga Agrell från sin första Ryssländsresa. Han var esperantist, hade som

Nur monaton pli poste mi trovis en la interreto demandon de iu Erik Agrell el Gotenburgo, kiu miris, ĉu iu havas informojn pri lia praavo Sigurd Agrell kaj liaj esperanto-sonetoj. Mi kompreneble respondis kaj havis sekve iom da korespondado kun li.

15-jara poeto

Lingvo Internacia publikigis regule listojn de la abonantoj. En la unua listo en 1896 la nomo kun numero 1 estas tiu de Sigurd Agrell, Örebro! Li estis tiam nur 15-jara. En la decembra numero de tiu jaro aperis lia unua poeziaĵo, traduko de "Birdoj migrantaj" de la sveda poeto E.J. Stagnelius. Sekvis pliaj tradukaĵoj kaj en aŭgusto 1898 lia unua presita originala poeziaĵo, "Al la stelo de l' espero". Ne precize majstroverko, sed tamen unua.

La unua presita poeziaĵo en la sveda sekvis kelkajn jarojn pli poste, en 1903 en la revuo "Strix". Ekzistas tamen, manuskripte, nepublikigita sveda poeziaĵo el 1897, kiel informis min Erik Agrell.

Erik Agrell preparas kiel plej kompletan bibliografion pri Sigurd. Dum tiu laboro li trovis plurloke referencojn al esperanto (vidu kelkajn citaĵojn je la flanko). Laŭ iu el ili Sigurd eĉ renkontiĝis kun Zamenhof kaj esperanto ludis decidan rolon en lia ekinteresiĝo pri la rusa lingvo. Evidente ankaŭ lia fratino lernis esperanton.

Sigurd Agrell sendis siajn tradukaĵojn kaj originalajn verkojn al *Lingvo Internacia* en Upsalo. Kiam la eldonado kaj redaktado transiris al Hungario, lia kunlaborado ĉesis. Kiam li ekstudis en Upsalo, la esperantoklubo jam ne plu aktivis (Langlet, Nylén k.a. eklaboris kaj ekagis aliloke), kio eventuale klarigas, kial lia nomo malaperis el la esperantomondo. Sed restas la fakto, ke konata sveda poeto komencis sian poezian karieron kiel esperanto-poeto. Kiel vi povas mem rimarki el la publikigitaj eroj ĉi tie, li jam tiam estis lerta.

Ĉiuj liaj esperanteroj estas troveblaj en la interreto je la adreso <http://www.algonet.se/~inko/agrell/>.

Franko Luin

La Nikso*

Ore la nubar' nuancas,
En herbej' la nimfoj dancas
Kaj la harpon ĉe l' rivero
Ludas Niks' en la vespero.

Kaj knabeto ripozanta
Sur la bordo odoranta
Ekaŭskultas je l' sonoro,
Krias en la nokta horo:

"Kial do vi ludi volas?
Ĉu vin tio do konsolas?
Mizerul', ho, ne per tio
Tamen plaĉos vi al Dio!

La belaĵojn en ĝardeno
La feliĉa de l' Edeno,
Hejmon de l' anĝeloj piaj
Vidos ne okuloj viaj!"

Niks' ekploras, sen respondo
Malaperas li en ondo.
Harp' silentas. Niks' post tiam
Ludas ĉe l' river' neniam.

(Orig. E.J. Stagnelius; *Lingvo Internacia* 1900:9)

* Je tiu tempo ne ekzistis la vorto "Nikso". Sigurd Agrell uzis en sia traduko "Nekk", laŭ la sveda "Näck". Mi anstataŭigis ĝin per la nun uzata vorto. FL

Turmento kaj konsolo

Mi en katenoj sur la ter' min movas,
Mi post aliaj sur la kamp' de l' ĝojo
Rikoltas dornojn nur, en ĉiu fojo
La dom' papera de la rev' forblovas.

Ho, en dezert' sovaĝa, nokta, trovas
Sin mia longa, malfeliĉa vojo,
Tintadas la katenoj de l' malĝojo
Post mi, – disrompi ĝin la mort' nur
povas.

Sed min la kant' konsolas, de l' ĉielo
al mi eĉ iam venas ĝi esperata
en orflugad' simile al anĝelo.

Ĉe ĝia ven' fariĝas mi libera
Dum unu fojo de l' katen' turmenta:
post mi sonoras nur la voĉ' arĝenta.

(Orig. (SA?); *Lingvo Internacia* 1900:8)

La unua neĝo

Ho, ĉirkaŭdancu dense en l'aero,
Mi vin salutas, bela neĝ' unua!
Gajiĝas nun eĉ mia kor' enua,
Kaj estas ree plena da espero.

Mi ne malgajas plu, ke sur la tero
Nudigiĝis ĉion la aŭtun' detrua,
Ke ne ridetas plu ĉiel' la blua,
Ne velkis ĉiuj floroj de espero.

La vintro venas, en la neĝ' malvarma
La nuda tero dormos, – sed pli
ĉarma
Ĝi unu fojon ree maldormigos.

Ho, dormu ankaŭ, mia kor' trankvila
En via neĝ', vin venkos sun' la brila,
–
Post longa tempo ree printempigos.

(Orig. Sigurd Agrell; *Lingvo Internacia*, 1900:1)

gymnasist skri-
vitet sonetter på espe-
ranto, offentliggjorda
i esperantouppfin-
naren Zamenhoff's
tidskrift, och hade på
sommaren farit till
Ryssland för att
besöka Zamenhoff.
Han hade då i för-
bigående lärt sig
ryska och därvid
upptäckt att ryskan
skulle bli hans fram-
tid, en avsikt han
fullföljde."
(John Landquist, *Som
jag minns dem*, 1949)

"[Rogatjeff] lär mig
[det ryska] uttalet och
hjalper mig med
översättning förme-
dels 'Esperanto', som
både han och jag tala
flytande. Esperan-
tisterna här äro
många och mycket
entusiastiska. Vi ha
ofta besök af dem
och har jag flera
aftnar varit inbjuden
till en del hem. Så t.
ex. till en polska
fröken Prohorovič-
Kočmarenko, som är
döfstum men det
oaktadt talar och
förstår 'Esperanto'
mycket bra och t.o.m.
gjort en resa till en
del esperantister i
Sverige under utställ-
ningsåret."
(*letero de SA al sia
patrino, St. Petersburg
11/8 1899*)

"Häriifrån har jag
returnerat ett kors-
band (esperanto
saker)."
(*letero al SA de lia
patrino, Strömstad
23/7 1906*)

"Och tack också för
brevet, som glädde
mig mycket – så
långt brev tror jag
aldrig du skrivit till
mig sedan i barndo-
men på esperanto!"
(*letero al SA de lia
fratino, Härnösand
25/3 1932*)

La stelo Betlehema

En okcident', ho stel'
Ekbruligita,
Lumu sur la ĉiel'
Senkovrigita!
Vin la paŝtista ar'
Sekvas volema,
Stel' Betlehema.

Nokt' super Juda land',
Nokt' super Zion, -
Ĉe l' okcidenta rand'
Mortas Orion.
Dormas l' infan' en pac'
En la dometo,
Kaj la paŝtist' en lac'
Sur la monteto; -
Vekas de l' voĉoj hor'
Ilin miranta,
Lumas en nokta hor'
Stelo brilanta.

Por la Edena cel'
Homoj foriras,
Vojon en nokt' la stel'
Al ili diras
Tra la bariloj for
de la vivado
Ĝis la pordeg' el or'
De l' feliĉado.
Tie anĝeloj jam
Brakojn etendas
Kaj el la buŝ' en am'
Vokon alsendas:
"Montras ne for la stel',
Hejmen nur ĝia cel'!"
Vin la paŝtista ar'
Sekvas volema,
Stel' Betlehema.

(Orig. Viktor Rydberg;
Lingvo Internacia 1900:2)

Epigramo

Al Di' popoloj du preĝadojn donas,
Ke ĉiu venku malamikon sian, -
Du fratoj, kiuj al la patr' admonas
Al unu helpi tranĉi la alian.

(Orig. Sigurd Agrell; *Lingvo Internacia 1899:10*)

Unuafoje en UK

Estis mia unua kongreso. Mi do aparte
interesiĝis pri tiu kongreso. Mi iris al
Adelajdo tra Bankoko kaj Singapuro kaj
alvenis vendredon la 18-an de julio kaj
ekloĝis en St Mark's College (Kolegio
de Sankta Marko) apud la Katedralo de
Sankta Marko. Tie mi kaj multaj espe-
rantistoj loĝis. La esperantistoj havis
propran tablon, kie ni povis paroli espe-
ranton dum la matenmanĝo.

La kongreso estis en Adelaide
Convention Centre ĉe la strato North
Terrace Street en la mezo de Adelajdo;
mi enskribiĝis ĉe la akceptejo sabaton
la 19-an de julio kaj tiam mi ricevis
dokumentojn kaj nomtabuleton. I 224
partoprenantoj estis registritaj, el kiuj
27 svedoj. Mi trovis dufoje Roland Lind-
blom en la kongresejo. Li estas membro
de la komitato.

La kongreso estis inaŭgurita de la
prezidanto Lee Chong-Yeong, la 20-an
de julio je la 10-a horo. La temo de la
kongreso estis "Toleremo kaj justeco en
multkultura socio". La ĝenerala sekre-
tario de Unuiĝintaj Nacioj, Kofi Annan,
sendis saluton al la kongreso kaj dankis
la esperantomovadon pro ĉio kion ĝi
faris por favori amikecon kaj kun-
laboron inter popoloj kaj nacioj.

Poste la prelegoj kaj lecionoj kom-
encis. Mi partoprenis en ĉiutaga kon-
versacia kurso. Instruisto estis argenti-


nano nomata Atilio. Ni dividiĝis en gru-
poj de kvin kaj la laboro plenumiĝis kiel
gruplaboro. Mi opinias ke tiu kurso don-
is plej al mi dum la kongreso. Paroli
kun homoj de la tuta mondo samtempe
donis eksterordinaran impreson. Mi
partoprenis ankaŭ en kurso pri anglaj
dialektoj, kiu aranĝiĝis en tri lecionoj.

Aranĝiĝis ankaŭ interesaj prelegoj.
Mi aŭskultis unu pri aborigenoj
aŭstraliaj, kaj unu pri la ĉina filozofo
Konfuceo. Krom lecionoj kaj prelegoj ni
vidis dancon de aborigenoj kaj
aŭskultis koncertojn de populara kaj
klasika muziko.

La merkredon mi partoprenis en
urba rondvojaĝo. La plej granda parto
de la urbomezo estis konstruita en la
pasinta jarcento, sed estas moderna
grandurbo de miliono da loĝantoj kun
industrioj kaj tri universitatoj. La lecio-
noj kaj prelegoj finiĝis vendredon la 25-
an de julio. Mi foriris sabaton la 26-an
de julio tra Sidnejo, Singapuro kaj Ban-
koko kaj alvenis al Arlanda lunde la 28-
an de julio je la sesa matene.

Mi estas kontenta pri la programo
kaj mi lernis multe da esperanto dum la
kongreso.

NI GRATULAS



Runo Stridell 95-jara

La 16-an de julio Runo Stridell celebris
sian 95-an naskiĝotagon. Naskita en
1902 en Norrköping, li de sia tria jaro
loĝis en Tannefors ĝis li en 1923 ekza-
meniĝis en Linköping kiel popollerneja
instruisto. Dum 43 jaroj li instruis en la
popollernejo de Östanbo ekster Söder-
hamn, kie li frue edziĝis kun sia kolegi-
no Signe. Du filoj estis naskitaj: Esbjörn
en 1926 kaj Kaj en 1931.

Pro deziro de bontemplanaj gejun-
uloj Runo startis studrondon pri Espe-
ranto en 1930. Lia intereso kreskis, kaj
baldaŭ floris viglaj esperantokursoj,
klubkunvenoj kaj vizitoj de ekzotikaj
prelegantoj en Östanbo kaj najbaraj lo-
koj, interpretataj de Runo.

Iom antaŭ la milito Runo dufoje vi-
zitis kuraclokon en Estonio kaj trovis in-
ter la esperantistoj multajn amikojn.
Dum la milito unu el ili fuĝis trans la
maro al Svedio kaj, dank' al Esperanto
kaj la geedzoj Stridell, povis komenci
novan vivon en nia lando.

Post la milito kaj precipe post sia
pensiĝo Runo vizitis multajn landojn,
inter alie plurajn esperantokongresojn.
En 1967 la geedzoj translokiĝis al Bo-
rensberg, kie Runo vidis esperanto-
kursojn kaj partoprenis la esperanto-
vivon en Motala kaj Linköping, i.a. kiel
preleganto kaj interpretanto. Signe for-
pasis en 1980. En sia 90-a naskiĝotago
Runo ricevis komputoron, kun kies hel-
po li tradukis svedajn librojn en Espe-
ranton. La komenco de "Ronjo, rabista
filino" de Astrid Lindgren, estis enkon-
dukita en La Espero 1995:6.

Depost 1995 Runo loĝas en Gulde-
den 7, Garpenberg, proksime al filo, ne-
pinoj kaj pranepoj. Lia resumato estas: La
jaroj rapide pasis - sed mi neniam enu-
is!

Sten Hannerz
El EKSpreso, organo de
Esperantoklubo de Stockholm 3/97

Esbjörn Stridell

La vaskoj



Ambaŭflanke de la franc-hispana landlimo, ne tre for de la prahistoriaj kavernaj pentraĵoj en la du landoj, sin trovas popolo al kiu la historio rifuzis propran landon. Ne estas tre malgranda popolo, sed tamen kulturo minacata pro asimilado kaj alkulturado. La kulturon vaskan influis diversaj popoloj, sed historiaj kaj lingvaj indikoj evidentiĝas ke la vaskoj diferencas de ĉiuj aliaj popoloj.

